

FERVOJA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO

Organo de INTERNACIA ASOCIO DE LA ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ

<p>Jara abono : S 1. Unu N° : S 0,2 Anoncoj : 1 paĝo : S 5 ; 1/2 paĝo : S 3 ; 1/4 paĝo : S 2.</p>	<p>REDAKCIO S-roj Berlande kaj G. Chilot Administrantaj Redaktoroj Sekretario: S-ro Alfred Petzold Königstrasse, 4 III, Leipzig (Germanujo) Prezidanto : S-ro P. Tarnow Perlebergstr. 9 I, Berlin-Potsdam.</p>	<p>Ĉiujn manuskriptojn, abonmendojn, anoncojn, k.t.p., adresu al S-ro BERLANDE aŭ al S-ro GEORGE CHILOT, ambaŭ en <i>Ville-neuve-St-Georges (Francujo)</i>. La redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — Artikolojn ne akceptitajn oni ne povas resendi.</p>
---	--	---

NOVAJ ABONANTOJ

S-ro Lienart, staciestro à Chaulnes de Picardie (Somme), France.

S-ro Otto Michlich, Eisenbahnsassessor, Wagenburgstrasse 74-1, Stuttgart.

Adressaĝo.

S-ro Agisson Léon, ĉefdesegnisto, 54 Avenue Daumesnil, Paris.

La novaj anoj, kiuj ne ricevis ankoraŭ siajn membrokartojn, insiste estas petataj sin turni al S-ro sekretario Alfred Petzold, Königstrasse 4 III, Leipzig.

Al I. A. E. F. anoj : kiam okazos en via ĉirkaŭaĵo ia ajn esperanta kunveno, iru kaj bruu por diskonigi nian ekzistadon.

Ĉeestu la Gentan esperantan semajnon, Aŭgusto 19-21. Ĉeestu ankaŭ la germanan Esperantan kongreson en Stuttgart, Aŭgusto 19-21, kaj ĉie propagandu por Esperanto ĉe la fervojistoj.

KONGRESO

Estas absolute necese, ke ĉiu fervojisto, kiu havos libertempon, ĉeestu la Bernan Kongreson (24-31. Aŭgusto); se li ne libertempas sufiĉe, li almenaŭ ĉeestu la ne kongresan kunvenon, kiu okazos lunde la 25-an de Aŭgusto. Por tiu kunveno la kongresa karto ne estas deviga. (Por sciigoj sin turni al S-ro Johano Perriard, ĝenerala direkcio des Chemins de fer Fédéraux à Berne (Suisse), por ricevi respondon aldoni respondan kuponon.)

Kelkaj rimarkoj kaj petoj.

— S-ro Aussenac, lokomotivejestro en Saint-Dizier, ĉeestonto de la Berna kongreso, esperas, ke la kongresa komitato ne ŝanĝas la datojn de la fiksitaj fervojistaj kunvenojn tiel same ke estis farita en Antverpeno. Li opinias, ke oni plialtigu la kotizaĵon, li pensas ke nia gazeto bone farus pliriĉigante sian enhavon, sed komprenante la malhelpon pro mono, li pacienca ĝentile.

— S-ro P. Haigh el Bradfort, skribas pri fervojista ekskurso de siaj kolegoj al Turin kaj Milan; la plej grava sciigo, li diras, estas ke la estroj de la Itala fervojo permesis al la anglaj fervojistoj vojaĝi senpage tra Italujo.

— S-ro Lundgren el Hedemora, konsentas partopreni la tradukon de la Berna internacia konvencio, li sendis jam resumon pri ĝi al nia kolego Petzold en Leipzig.

— S-ro Hans Nüsslein, ĉiam laboras fervore por ni en Regensburg, plie ĉiu el ni, kiu bezonis servon privatan, ricevis de li ĝentilan helpon.


— La samaj holandaj kolegoj vizitinte Parizon la lastan jaron, intencis viziti Kopenhagon tiu jare. Ĉu ili ĝin faris?

— S-ro Hans Reuss, supera termezuristo, respondis jene al la demandoj de la n-ro 9.


1-e Laŭ mia opinio ne estos tro malfacile aldoni esperantan tradukon al ĉiu letero sendita al fremda kompanio, se la letero estos skribita en gepatra lingvo.

2-e Malgraŭ la plej grandaj klopodoj de la bavaraj rondoj Esperanto bedaŭrinde nur tre malrapide prosperas en la vicoj de la fervojistoj.

3-e Ĉar mi ne konas la Bernan Konvencion, estas nature ne eble por mi jesi ĉi tiun demandon. Sed mi opinias, ke subtenata per bona kaj taŭga vortaro, ankaŭ ĉi tiu temo ne estus tro malfacila. Estus nur ankoraŭ la demando, ĝis kiam ĉi tiu traduko devas esti finita kaj kian volumenon enhavas la Konvencio.



Du fervojaj direktoroj, kiel lokomotivisto kaj hejtisto.



Vere amerikane aspektas la jena rakonto, kiun raportas la « Railway Age Gazette ».

Du direktoroj de la Denver kaj Rio-Grande fervojo (la ĉefsuperintendento kaj superintendento) estis dum longeta inspektora vojaĝo malproksimaj de sia celo Salt Lake City ankoraŭ 27 km., kiam konstatiĝis, ke la lokomotivisto kaj la hejtisto jam estis deĵorintaj dek ses horojn kaj nun estis transpasontaj la plej longan deĵordaŭron, kiu estas permesata per la leĝo. Mallonge decidinte la nomitaj ambaŭ superaj oficistoj suriris la lokomotivon kaj volonte uzis la okazon, por montri, ke ili de sia iama servo posedis ankoraŭ sufiĉajn konojn pri la praktika fervojservado, por anstataŭi lokomotiviston kaj hejtiston. Sen malhelpoj kaj danĝeroj ili kondukis la vagonaron al la celo, dum la anstataŭataj lokomotivisto kaj lia hejtisto, certe por sia propra granda kontentigo, estis sidigintaj en la salonvagonon de la direktoroj.

Esperantigis : Komo el Danzig.



LA STACIA SONORILO

Ĝis antaŭ kelkaj jaroj, en Holando, la vagonaroj foriris post tri batoj sur la stacia sonorilo, eble tiu kutimo ekzistas ankoraŭ ie. Kvaronon antaŭe, oni sonorigis tutan sonoradon... por aĉeti biletojn, du batojn por enveturiĝi, kaj la tri famajn batojn. Dum pli ol kvindek jaroj oni ne povis manki tiun sonoradon ; vilaĝanoj kelkfoje demandis pri la « stacia sonorigileto », sed tempoj ŝanĝiĝis kaj ni kun ili. De kie venis la nomita kutimo ? En jaro 1632 oni starigis servon de treniĝa ŝipo kun ĉevalo, inter Amsterdam kaj Haarlem, por kio oni intence elfosis specialan kanalon, kaj skribis regularon kaj horaron. Ĉiu hore foriris ŝipo en ambaŭ direktoj post sonorado de ŝipisto, kaj tuj post « malvarmiĝo » de la sonorilo, la ĉevalo ektiris.

Verŝajne tio estas la deveno de la stacia sonorilo, ĉar post du jarcentoj (1859), oni malfermis en Holando la unuan fervojon inter la samaj urboj kaj sonorigis kiel kutime.

BAL, Breda.

KURIOZA DEMANDO

Kamparano iris al fervoja stacidomo kunportinte grandan lignan kaĝon enhavantan porkon, kiun li deziris forsendi per la vagonaro. Sed, kutime, oni sendas en kaĝoj nur birdojn ; porkoj kaj aliaj bestoj vojaĝas ligitaj per ŝnuroj. Tial la staciestro ne sciis kiom da mono la kamparano devis pagi, ĉar la tariflibro troviĝis kalkuloj por « birdoj en kaĝo » kaj « bestoj ŝnurligataj » sed ne « porkoj en kaĝoj ».

Por solvi la malfacilaĵon li tuj decidis telegrafi al la direktoro de l' fervojo la jenon :

« Ĉu porko en kaĝo estas birdo ? »

B.

GRAND HOTEL DU GLOBE

71, rue Monge, Paris

Proksime Jardin-des-Plantes, Sorbonne, Jardin du Luxembourg kaj Presa Esp. Societo.

A. LECLERC, posedanto.

Hotelo rekomendinda al Esperantistoj.

MODERNA KOMFORTO. — BONA SERVADO. — MODERAJ PREZOJ.

— Esperanto parolata. —

Centra Presejo Esperantista, V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Le gérant : A. BERLANDE.